



# PENSEO

*N-ro 225*

*julio. / 2010*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 21-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Josip Pleadin (Kroatio)



### NEPLENUMITA REVO

Perforte la vivo ŝiris min kun radiko  
el patra lulilo dum tempo de mizero.  
Forĵetita dise kiel sensema spiko  
mi vagas kaj loĝas en kaduka kamero.

En fremda mondo plantita laborskklavo  
vegetas sen amo, konsolo kaj espero.  
Albume mutas fotoj de morta praavo.  
Korŝire frostas kaj vintro kaj somero.

La sola deziro: reveni al patrujo,  
dum peza laborado fleksas mian spinon.  
Neplenumita revo: en hejma florbedo  
albrustigi kaj kisi maljunan patrinon.

## Imre Szabó (Hungarujo)



### Ne plu estas

kuras la tempo kaj kiel ĝi kuras  
ĝi levadas la kruojn  
kvazau el fajro,  
el viva braĝo ĝi levedus ilin  
sed por paroleti kun vi  
mi haltus en domenirejo  
ne ĝenus min  
ke mortero defalas morte  
kaj ŝpruce lavangas la kelfetoro

bele silente  
mi ordonus  
al la elementoj

mutiĝu nun  
ĉar mi devas voĉi  
sidiĝu humile ĉepiede  
ĉar nun ankaŭ anstataŭ vi  
mi voĉos  
ekflagros la tero bluafajre  
ĝiaj sveltaj branĉoj ĉielaj radikoj  
mi voĉos nun ankaŭ anstataŭ vi

sed mi devas iri  
ne plu estas vortoj  
nur la ĉionviŝa vetero de tempo

## Helena Tylipska (Italujo)

### LA NOKTA DEKATLONO



Kelkaj flektoj, pelvo-tordoj  
kaj profundaj enspiroj  
por malstreĉi muskolojn,

por etendi la kolon.  
Dekstraflanke.  
Maldekstre.  
Surdorse.  
Surventre.  
Fermiĝas la okuloj.  
Ho! Ve!- Pikas min kulo!  
Sen lumigi la ĉambron  
mi palpas la skatolon  
kaj englutas kun akvo  
la diazepam-pilolon.  
Fermiĝas la okuloj,  
sed la cerbo laboras...  
Uff... la kapo doloras.  
Ĉu mi en kuirejo  
faru la kamomilon ?

Eble ŝanĝi la liton  
 por alia dormilo.  
 En ĉiel' brilas la steloj  
 ĉirkaŭ la lun' maldika.  
 Espereble la pilol'  
 fariĝos efika.  
 La nokturnoj de Chopin  
 vekigas nostalgion,  
 ĉu por dormi, pli taŭgos  
 aŭskulti nenion ?  
 Bruegas voj-trafiko,  
 palpebrumas la steloj,  
 zumas la kul' senĉese,  
 krevas miaj oreloj.  
 Mi kalkulas la ŝafojn  
 sur enĉambra ĉielo...  
 La nigra ŝafaro  
 tra nigra montaro.  
 Ilin ĉiujn pribojas  
 La hundo de najbaro.  
 Mia grego silentas,  
 kial ĝi bojaĉas?  
 Ĉu ankaŭ al hundo  
 la nokto ne plaĉas?  
 Sub la liton mi ĵetis  
 horloĝon, la ĉinan,  
 ĝi tikas kaj takas,  
 horojn puŝas, obstina.  
 Eĉ la luno ekdormas,  
 jam paliĝis la steloj  
 kaj komencas ĉirpi  
 vekigantaj paseroj.  
 Venas la mateno,  
 kaj sur mia kuseno  
 estas ruĝa makulo  
 de, ĉinokte murdita  
 vampiro - la kulo.



## Anna Karlik (Hungarujo)



### Mi ne povas esti alia

(Vi intencas min defendi...)

Kvankam mi ne volas plendi,  
 mi ne povas ne dependi...  
 Por mi ĉiam estis grave  
 sincere kaj pure vivi.

Kiel eblus nur duone?  
 Tutkore mi povas ami.  
 Kiel povus mi duone?  
 Ja nur plene eblas ami!

Silenti pri sentimentoj  
 memfraŭdo estus vere,  
 mensogi pri propraj sentoj  
 ofenda ĝi estas ege.

## Lumina ( Irano)

### Dediĉo al kara Imre

estis nokto, estis nokto kaj ĉielo plen-plena de  
 silento

estis mi, estis mi kaj maro plen-plena de muĝo

estis nokto, estis nokto kaj grenkampo  
 plen-plena de cikadoj

estis mi, estis mi kaj sino plen-plena de  
 kurieraj floroj

estis nokto, estis nokto kaj stepo plen-plena de  
 steloj

estis mi, estis mi kaj kap-kuseno plen-plena de  
 rememoroj

estis nokto, estis nokto kaj dezerto plen-plena  
 de miraĝoj

estis mi, estis mi kaj nubo plen-plena de  
 pluvo!

## Cezar (Germanujo)



# Kokteleja ĝojo

Belajn dentojn ŝi havas,  
laŭ figuro tre ravas.  
Krome ŝia rideto  
estas verva impeto.

La boteloj en vicoj  
estas ŝiaj komplikoj  
por la ĝojaj atakoj  
al sinjoroj kaj frakoj.

Kokteleje la ino  
nin konkeras per vino,  
ĝis de ĝi ni dependas,  
ĉar ni ĉarmon kunmendas.

Dum ĉe l' fin' ni ebrias,  
ŝi ridante mencias:  
"Ne elverŝu de l' glaso,  
kostus kromon ĉe l' kaso."

# Trumpetist' Sandro



**esperantigis**

## VIZI László (Hungarujo)

(kanzonteksto)  
Sandro, muzikamant',  
Ludu ja nia band',  
Trumpet' denove por  
Ĝui, ne restu for!

Hoj, trumpetist' Sandro, hoo  
En nia bando,  
Jen la vekhor', de lito tuj for,

Muziku Sandro el kor'.

Eĉ se krakada bru',  
Ludu, muziku plu,  
Ludu sen akcident',  
Blovu, kiel la vent',

Hoj, trumpetist' Sandro, hoo  
En nia bando,  
Jen la vekhor', de lito tuj for,  
Muziku Sandro el kor'.

(Senteksta koruso)

Hoj, trumpetist' Sandro, hoo  
En nia bando,  
Jen la vekhor', de lito tuj for,  
Muziku Sandro el kor'.

Sonu komuna kant',  
Sonu ĝis mondorand',  
Se volas nin vidi hom',  
Konatas ja nia dom'.

Hoj, trumpetist' Sandro, hoo  
En nia bando,  
Jen la vekhor', de lito tuj for,  
Muziku Sandro el kor'.

## Lode Van de Velde (Belgio)

### Recenzo pri "Novaj vestoj

### de l' reĝo" de Vejdo

("Fenestro", majo 2010)

Verki prozon estas relative facile (por tiuj kiuj bone scipovas rakonti), kompare al la verkado de poezio. Malgraŭ tio, poezio ne estas traktata sufiĉe serioze de multaj homoj kaj poetoj havas la reputacion esti revemuloj. Certe, troviĝas tiaj, sed certe ankaŭ inter prozistoj.

Tiu ĉi rerakonto en fiksita versformo (Busuanzi, 5/5/7/5, ABCB) de la klasika fabelo de Andersen vere meritas nian atenton, ĉar malgraŭ la forma limigo, la re-aŭtoro uzas tre riĉan kaj varian lingvaĵon sen tro da "elturniĝoj" pro rimo aŭ pro silabonombro. Estas eĉ tre interese vidi la diversajn trovitajn solvojn de Vejdo. (Kaj fari la samon 'ekzercon' en progresiga kurso estas bonega lingva ekzerco, do mi certe konservos la poemon!)

Ja unu bedaŭrindaĵo estas la kaptilo de la duobla negacio: la vestoj NE videblas por tiuj kiuj NE estas saĝaj. Aŭ, pli simple: la vestojn vidas nur saĝuloj (laŭ la trompantoj de la fabelo). La dua parto de la 7a kaj la unua parto de la 8a strofo tekstas: << La vestoj faritaj el / ĉi tiu ŝtofopec' // ne videblas por / tiuj kun saĝec'. >> sed klare devus esti: << La vestoj faritaj el / ĉi tiu ŝtofopec' // ne videblas por / tiuj SEN saĝec'. >>

Se oni korektas tiun eraron - sufiĉas adapti 2 literojn - ni havas fabele majstran poemon!

## Ĉineske

### Guozhu (Ĉinio)



**Junia Amikec-akcela**

**Kunsido en Huhhoto**

—laŭ ĉinesko Shuidiaogetou\*

Verda junio,/ 2010 (dumil dek)-jara.

Solena kunsido/ familiara

en Huhhot, honore/ al Lisen, pro lia/ merit' elstara.

Etos' intima/ kaj solidara.

Omaĝ' kun/ admiro/ vers-para.

Bondeziro/ pri aĝo teo(cent-ok) jara.

Prelego kor-verŝa./ Bela perspektivo/ per tost' nektara:

Sub nuboj vela/ galop' sur-mara!



\*Shuidiaogetou (Preludo de Akva Melodio):

ĉina fiksforma poemo el du strofoj de 9 kaj 10 versoj respektive de 55,65,665,55/333,47,665,55 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xxa,xa/ xxa,xa,xxa,xa (x=senrima).

### Sam (Ĉinio)

## Mi volus fariĝi pluvo

—laŭ ĉineska skemo Niannujiao\*

vi diras ke  
jam tuje  
forvelkos via kor'  
mi tre volus  
fariĝi  
pluv' je ĝust-tempa hor'  
mi akvumu  
vian koron  
kun ena dolor'  
jen per mia  
diligenta labor'

se mi vera pluvo  
fariĝus onte  
mi sen langvor'  
disŝprucas sur  
la teron  
por vi kaj via flor'  
por feliĉo  
via en vivo  
neniam plor'  
okazu ĉe  
vi mem mia trezor'

## Cindy Mckee (Usono)



## Teropeco al nuboj

—laŭ ĉineska skemo Niannujiao\*

En pluvguto  
 enestas  
 jama, vivanta kor'.  
 En pluvguto  
 enestas  
 jama, vivporta flor'.  
 Mi tre volus  
 havi ambaŭ.  
 El strikta rigor'  
 mi rigardas  
 al via forvapor'.

Se vi, vera pluvo  
 volonte gutus  
 sur mia por'  
 mi fariĝus,  
 volonte,  
 onta, vivporta flor'  
 por flori al  
 vivtena, anta,  
 vivanta kor'.  
 Ĝustatempe  
 vi mem estas trezor'.

\*Niannujiao (ĉarna kantistino): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)



## Vejdo (Ĉinio)



## Trankvila vivo en vilaĝo

—laŭ ĉineska skemo Guizhixiang\*

legad' sen ĝen'  
 kovras la vivon  
 for de ĉagren'  
 malproksime de bru'  
 la pens-faden'  
 vagas de ter' al ĉiel'  
 libere  
 kun tempa tren'  
 ŝvebe fluge  
 glite flose  
 ĝojplene jen

en herboriĉa ĝarden'  
 paŝas laŭpade  
 mi per promen'  
 por liberiĝi de  
 enkora splen'  
 mia koro kvietas  
 malstreĉe  
 sen interven'  
 taga enu'  
 jam vanuis  
 tute en sven'

\*Guizhixiang (aroma laŭbranĉo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 4, 54, 64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

## Spektado al drak-boata konkurso\*

—laŭ ĉineska skemo Daolianzi\*\*

boatoj  
 je signal'  
 eksturmas kontraŭ rival'  
 antaŭen kun ondŝaŭmo  
 kiel galopa ĉeval'

plenplenas

tra aer'  
brua sonad' kun fier'  
de tamburad' kaj gongad'  
el boatoj sur river'

sur bordo  
varma bol'  
eksplozas el la popol'  
ĉantad' por kuraĝigo  
kaskade ondas en fol'

remantoj  
jen kun ŝvit'  
svingas brakojn sen hezit'  
elane kun energi'  
por la premi' de merit'

huraad'  
ovaci'  
kaj entuziasma kri'  
iras al la ĉampion'  
viva en ĝoja ebri'



*\*Drak-boata konkurso kutime okazas dum ĉina tradicia Drak-boata Festo (la 5-an de la kvina monato laŭ luna kalendaro), dum kiu oni memorfestas ĉinan antikvan poeton Qu Yu (304-278 a.K.).*

*\*\*Daolianzi (kanto de lavantino): ĉina fikforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)*

## Eto (Ĉinio)

### Soifo

—laŭ ĉineska skemo Busuanzi\*  
je ekvid' de vi  
mi kun korinklin'  
tuj naskis amon en mi  
la amon sen fin'

via svelta korp'  
vere ravas min  
viaj lipoj seksvekaj  
logas kun obstin'

mi sopiras vin  
sen ajna intrig'  
mi soifas tagnokte  
por la ama lig'

mi volas ĉion  
ĵeti per prodig'  
ja por kunvivi kun vi  
en ama navig'

*\*Busuanzi (aŭguristo): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.*

## Lily (Ĉinio)

### Amora rendezvuo

—laŭ ĉineska skemo Tiaoxiaoling\*  
aspir', aspir'  
kun enkora alir'  
rendevu' espera  
nuda ludo vera  
rave, rave  
al l' amato brave

jame, jame  
ardas emo flame  
glitas ama revo  
kun flugila levo  
vole, vole  
tuj al li sangbole

kune, kune  
ni kveradas nune  
en kabano vaka  
je rondiĝo braka  
kara, kara  
intimo senbara

nuda, nuda  
 prezentado luda  
 per ag' de kuraĝo  
 al ama vojaĝo  
 ĝoja, ĝoja  
 amoro ĉifoja

bole, bole  
 lia kac' malmole  
 mia piĉ' malseke  
 jam ŝvele seksveke  
 eke, eke  
 li suĉas langleke

krie, krie  
 mi ĝemas pasie  
 korpa tord' en ŝvebo  
 fortostreĉ' kun strebo  
 bore, bore  
 li piŝtas fervore

pete, pete  
 mi krias ripete  
 "libere diboĉu  
 al pugo alkroĉu"  
 ĉuro, ĉuro  
 ŝprucas en plezuro

*Tiaoxiaoling (flirta kanto): ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimarango de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.*



### **Pentrita de Eder Benedetti (Brazilo)**

## **Mandio (Ĉinio)**

# **Mi estas verda folio**

—laŭ ĉineska skemo Fengrusong\*

Mi estas verda foli'.  
 Nenion el Di'  
 mi avide deziras.  
 Kaj mi nur  
 kun kora pi'  
 akompanas floron  
 en sunluma radi'.

Ne povas kun papili'  
 gaje danci mi,  
 ĉar ŝi nur flirtas kun flor'.  
 Same dronas en ebri'  
 mi per apreca spekt'  
 sen ajna fantazi'.



## **Cindy Mckee (Usono)**

# **Biso de akvo**

—laŭ ĉineska skemo Fengrusong\*

Mi, dinosaŭra piso,  
 saliva kiso,  
 falante kaj levante,  
 pluvante.  
 Mi, Tigriso,  
 gutoj skuigitaj  
 el velo dum hiso.

Mi, likvo el peniso,  
 de sur narciso,  
 falante kaj levante,  
 en cikla kompromiso.

Mi neniam mortas  
sed vivas en diso.

*\*Fengrusong (vento inter pinoj): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa,xa / a,a,xa,xa (x=senrima)*

## Lode Van de Velde (Belgio)

Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

# Ekslibriso

Dima revenis hejmen, kontenta pri sia nova libro, libro kiu ŝanĝos lian vivon. Post formeto de siaj jako kaj ŝuoj, li tuj iris al sia laborĉambro, kiu simple odoris je libroj: novaj kaj malnovaj libroj vice kaj etaĝe tronis de la planko ĝis la plafono, pretaj por tuja konsulto aŭ tralego, sed plejparte senlaboraj. Sur la ligna skribotablo apud la fenestro staris skribmaŝino kaj apud paperfaskoj ujo kun skribiloj. Aliflanke de la biblioteko, granda staranta pendolhorloĝo senlace indikis la tempon. La libroŝrankoj ie-tie estis ornamitaj per statueto, skatoleto aŭ simila objekto. Dima eksidis en la leda fotelo kaj el tirkesto prenis skatoleton kun malgrandaj, sed belaj paperslipoj: centoj da identaj ekslibrisoj. Sur la slipoj staris lia denaska nomo Dima Perković en bele ornamitaj literoj kun sub ĝi bildo de multkolora papilio, sidanta sur paĝo de malferma libro. Tute sube troviĝis lia adreso en Zagrebo. Li zorge gluis la slipeton en la libron kaj refermis ĝin por meti sur faskon kun kelkaj aliaj libroj. El la sama tirkesto, li prenis kajeron, malfermis ĝin ĉe la paĝosigno kaj enskribis la plej gravajn datumojn de la nova libro: "Kie papilioj flugas" – aŭtoro – urbo – jaro – ISBN. La libron li ne legos, ĉar li jam konas la enhavon. Anstataŭe, li kunportos la libron al sia propra butikoj: librobrotejo en la centro de Zagrebo. Tie, li denove vendos la libron, prefere al iu turista, sed kompreneble ankaŭ al iu ajn interesito. Dima estis 45-jara,

mezstatura viro kun ĝentila mieno; ĉiam tre afabla, sed samtempe iom distanca kaj fermita. Liaj haroj havis la saman brunan koloron kiel liaj okuloj. En sia librejo, li ĉiumatene legas la ĵurnalon, foje murmurante komentojn, foje ridetanta, sed kutime sufiĉe serioze kaj koncentrite. Poste li solvas la krucvortenigmon, ĝenerale kun malmulte da peno, fojfoje konsultante vortaron aŭ atlason de proksima breto. La libro kiun Dima tiun tagon kunportis, restis 4 semajnojn en la montrofenestro, fine li metis ĝin en la bretaron inter aliaj romanoj. Pasis monato, du monatoj, foje iu foliumis la verkon, remetis ĝin, prenis alian libron, revenis al la unua kaj tiel plu. Pasis preskaŭ jaro dum kiu Dima aĉetis kaj vendis aliajn librojn, iuj kun ekslibriso, aliaj sen. Finfine iu virino tamen aĉetis la libron por legi dum sia vojaĝo, kune kun kelkaj aliaj libroj. Ŝi fakte loĝas en Germanio, eksciis Dima, sed ŝi havas parencojn apud Zagrebo, do ŝi profitas de la okazo havigi al si legaĵojn en sia propra lingvo, ĉar malfacile akirebla eksterlande. Dima bele pakis la librojn en tipe helbruna papero kaj ŝovis ĉion en plastan sakon kun la adreso kaj emblemo de sia vendejo. En la trajno hejmen tamen, la virino endormiĝis legante la libron – ne ĉar ĝi estis malinteresa, sed pro la ritma ĉukĉuk-sono de la lokomotivo, la kdengkdeng-bruo de la radoj sur la reloj kaj la komforta seĝo en trankvila kupeo. Kiam la trajno alvenis en Frankfurto kie ŝi devis ŝanĝi, ŝi ŝoke vekigis, rapide prenis siajn jakon, mansakon kaj valizon kaj hastis eksteren... sen la libro. La trajno rapide poste pluveturis, kun la libro ankoraŭ en la dorspoŝo de la seĝo antaŭ ŝi. Foje iuj pasaĝeroj rigardis ĝin, iu eĉ trafolumis ĝin, sed sen interesiĝo pro la 'stranga lingvaĵo' kun ĝiaj strangaj haĉetoj kaj akcentoj. En la trajnremizo, purigisto kunportis la libron por meti ĝin ĉe la aliaj forgesitaĵoj. Neniu venis por peti ĝin, do oni portis ĝin kun aliaj libroj al proksima brokantejo por havi iom da



kromenspezoj. Kaj tie ĝi denove atendis aĉetonton... dum pluraj monatoj. Relative rapide ĉi-foje tamen, vojaĝanto prenis ĝin... estis nur malmultaj kroataj libroj tie aĉeteblaj



kaj la vendisto konis siajn klientojn kaj atentigis ilin pri la nove alvenintaj libroj. La koncerna viro komplete legis la libron; parte dum vojaĝo, la ceteron li hejme tralegis. Tiu

ĉi viro, Vlado, loĝas apud Amsterdamo kaj havas amikinion, ankaŭ de kroata deveno, kiun li foje vizitas. Estis por ambaŭ ĉiam ege agrable ne nur povi paroli en la denaska lingvo, sed ankaŭ pri aferoj kiuj koncernas la hejmlandon kaj kiujn aliaj ofte ne povas kompreni. Dum unu el siaj vizitoj, li donacis al ŝi la libron kiun li aĉetis en Germanio, ĉar li sciis ke ĝi plaĉus al ŝi. Kaj efektive: Mila tuj ŝategis ĝin, ĉar temis pri papilioj – nu, almenaŭ la titolo enhavis la vorton, do ŝi estis jam tre pozitiva pri ĝi kaj kontenta. De ĉiam ŝi amas papiliojn kaj intertempe kolektis multajn objektojn en sia hejmo kun tiu motivo. Ŝi gaje malfermis la libron kaj ne povis ne rimarki la belan gluaĵon en ĝi: ekslibriso kun papilio sidanta sur malferma libro... kaj kiam ŝi legis la nomon super la bildo, ŝi preskaŭ svenis: Dima Perković. Dum 2-3 sekundoj ŝi ne spiris kaj Vlado konfuzite ektimis pri ŝia sano. Tiam Mila larve ekrakontis al li pri sia amiko el junaĝo: "Ĵus antaŭ la milito ni estis najbaroj. Mi estis eble 15-jara knabino kiu adoris sekvi papiliojn, Dima kutime sidis ekstere legante. Iun tagon ni kune sidis malantaŭe en la ĝardeno, babilante kiel ni ofte faris. Subite, sen ia signo, estiĝis silento dum ni rigardis unu la alian, alproksimiĝis kaj donis mallongan kison. Ni longe restis tie, manon-en-mano. ...sed tiun nokton eksplodis

la milito kaj mia familio fuĝis eksterlanden." Unu semajnon poste en Zagrebo. "... mia patro estis forvokita por militservi, nia domo estis ruinigita, do ni loĝis ie en keloj, havis tre malmultajn manĝaĵojn kaj ĉiam la samajn, poste venis nutraĵpakaĵoj senditaj per usonaj aviadiloj, do ni manĝis el tio, sed panjo malsaniĝis kaj mi devis iri al orfejo, kie mi poste aŭdis ke nek panjo, nek paĉjo ĝisvivis. La tutan tempon, mi pensis pri vi, Mila, kaj nia unusola kiso. En la bunkroj en la mallumo, vi estis tie, kaj ankaŭ poste, ĉiam kiam mi vidis papilion, mi pensis pri vi!" "Post la milito, mi provis trovi vin, mi multe serĉis ĉiufoje kiam mi estis en Kroatio, sed neniu en la vilaĝo sciis kien vi iris." "Jes, ankaŭ mi. Mi ne sciis kien vi iris, kaj plie, mi estis sendita al alia familio kiu adoptis min kaj ankaŭ ŝanĝis mian nomon." "Ah, tial mi ne trovis vin en la telefonlibro de Zagrebo!" "Jes, kaj tial mi komencis fari ekslibrisojn kun mia vera nomo, kun papilio en la desegno kiu reprezentu vin, kaj libro por mi. Mi aĉetadis librojn pri papilioj, engluis ekslibrison kaj denove vendis ilin, foje postlasis en trajno, eksterlande kaj tiel plu... en la espero ke ĝi atingos vin. Mi scias ke estas tre idealisme kaj eble naive, sed tamen." "Ho Dima, sed kiel vi sukcesis daŭrigi tiel longe?" "Ah, Mila, oni neniam forgesas sian unuan amon!" "Ho, Dima, kara, kara Dima! Mi bedaŭras, pardonpetas, sed post kiam mi ne trovis vin - eĉ ne sciis ĉu vi entute ankoraŭ vivas, kaj en tiu alia lando kien oni portis min, kun ĝia tute alia vivmaniero, mi edziniĝis kaj havas infanon." "Pri tio ne zorgu, Mila. Mi estas sufiĉe matura por scii ke tio povis okazi. Eĉ estis verŝajne. Mi ĝojegas ke vi estas viva kaj feliĉa! La nescio por mi estis pli terure ol iu ajn novaĵo, kiom ajn malbona. Nun mi estas liberigita kaj povas daŭrigi mian vivon." Kiam je tagmezo la kanono de la turo Lotrščak pafis, kiel ĝi ĉiutage ekzakte je la 12a horo faras, Dima fermis sian vendejon kaj promenis kun Mila

manon-en-mano al restoracieto por tagmanĝi, kiel unufoje ĉiujare ekde tiam. Post la forpaso de sia nederlanda edzo, Mila reiris al Kroatio kaj ekloĝis kun Dima. La lastajn jarojn de ilia vivo ili tute agrable pasigis kune.

## Guy de Maupassant



(1850-1893)

### La mortintino

Mi frenezege amis ŝin! Kial oni amas? Kiom strange estas, ke oni vidu nur unu estulon en la mondo, ke oni enhavas nur unu penson en la menso, nur unu deziron en la koro, kaj nur unu nomon en la buŝo: nomo kiu senĉese elŝprucas, kiu elŝprucas kiel la akvo de iu fonto, el la profundeco de la animo, kiu alvenas al la lipoj, kaj kiun oni diras, kiun oni rediras, kiun oni senĉese murmuris, ĉie, tiel preĝo.

Mi tute ne rakontos nian historion, ĉar amo havas nur unu historion, ĉiam la saman. Mi renkontis ŝin, kaj mi amis ŝin. Jen la tuto. Kaj, dum unu jaro, mi travivis en ŝia tenereco, en ŝiaj brakoj, en ŝiaj karesoj, en ŝia rigardo, en ŝiaj roboj, en ŝia parolo, envolvita, korligita, enkarcerigita en ĉio tiu kiu devenis de ŝi, per maniero tiom plena, ke mi ne plu sciis, ĉu taglumis aŭ noktis, ĉu mi estis mortinta aŭ vivanta, ĉu mi estis sur nia maljuna Terglobo aŭ alia loko.

Kaj jen ŝi mortis. Kiel? Mi ne scias, mi ne plu sciis.

Iun pluvan vesperon, ŝi rehejmiĝis tramalsekiĝita, kaj la posta tago, ŝi tuis. Ŝi tusadis dum ĉirkaŭ unu semajno, kaj enlitiĝis.

Kio okazis? Mi ne plu scias.

Kuracistoj venis, skribis, foriris. Oni alportis kuracilojn, kiujn virino trinkigis al ŝi. Ŝiaj manoj estis varmaj, ŝia frunto brulvarma

kaj malseka, ŝia rigardo brila kaj malgaja. Mi parolis al ŝi, ŝi respondis al mi. Kion ni diris? Mi ne plu scias. Mi la tuton forgesis, ĉion, ĉion! Ŝi mortis, mi tre bone memoras ŝian malgrandan suspiron, ŝian malgrandan suspiron tiel malfortan, la lastan spiron. La hejmfleganto diris: «Ha!» Mi komprenis, mi ja komprenis!

Mi nenion plie sciis. Nenion. Mi vidis pastron, kiu prononcis tiun vorton: «Via amorantino.» Ŝajnis al mi, ke li insultis ŝin. Ĉar ŝi estis mortinta, oni ne plu rajtis scii tion. Mi elpelis lin. Alia venis, kiu estis tre bona, tre milda. Mi ploris kiam li parolis al mi pri ŝi.

Koncerne la enterigon, oni konsultis min pri mil aferoj. Mi ne plu scias. Tamen, mi tre bone memoras pri la ĉerko, pri la bruoj de la martelfrapoj kiam oni enajlis ŝin. Ha! Dio mia!

Ŝi estis enterigita! Interito! Ŝi! En tiun truon! Kelkaj personoj estis venintaj, amikinoj. Mi fuĝis. Mi forkuris. Mi longtempe piediris tra la stratoj. Kaj mi rehejmiĝis. La posta tago mi foriris por vojaĝi.

Hieraŭ, mi revenis Parizon.

Kiam mi revidis mian dormoĉambron, nian dormoĉambron, nian liton, niajn meblojn, la tutan domon, en kiu postrestis ĉio kio postrestas de la vivo de iu post la morto, mi estis ekkaptita de afliktoevento tiel violenta, ke mi preskaŭ malfermis la fenestron, por min ĵeti en la straton. Ne povante resti plue meze de tiuj aĵoj, de tiuj muroj, kiuj estis enteninta ŝin, ŝirmis ŝin, kaj devis konservi, en siaj nepercepteblaj fendetoj, mil atomojn el ŝi, el ŝia karno kaj el ŝia spirado, mi prenis mian ĉapelon, por fuĝi. Subite, kiam mi preskaŭ atingis la pordon, mi pasis antaŭ la granda spegulo de la vestiblo, kiun ŝi metigis tie, por ke ĉiutage, elirante, ŝi vidu sin, dekapte ĝis piede, por ke ŝi vidu ĉu ŝia tuta tualeta estis konvena, ĉu ŝi estis deca kaj bela, de botetoj ĝis kapvesto.

Kaj mi haltis abrupte antaŭ tiu spegulo, kiu ofte reflektis ŝin. Tiel ofte, tiel ofte, ke ĝi certe konservis ankaŭ ŝian bildon.

Mi estis tie, staranta, tremetanta, fikse rigardante la vitron, la platan, profundan, senhavan vitron, sed kiu estis enhavinta ŝin tute komplete, posedinta ŝin tiom ol mi, tiom ol mia pasia rigardo. Ŝajnis al mi, ke mi amis tiun vitron – mi tuŝis ĝin – ĝi estis valvarma! Ho! La memoraĵo! Kia memoraĵo! Doloriga spegulo, brulanta spegulo, vivanta spegulo, horora spegulo, kiu suferigi ĉiujn torturojn! Kiom feliĉas la homoj kies koro, tiel spegulo sur kiu glitas kaj viŝiĝas la rebriloj, forgesas ĉion kion ĝi enhavis, ĉion kion pasis antaŭ ĝi, ĉion kion rigardadis en ĝi, admiris en ĝia korinklino, en ĝia amo! Kiom mi suferegas!

Mi eliris, kaj kontraŭvole, ne sciante, ne volante, mi iris al la enterigejo. Mi trovis ŝian tombon tute simpla, marmora kruco, kun tiuj kelkaj vortoj: «Ŝi amis, estis amita, kaj mortis.»

Ŝi estis tie, sube, putrinta ! Kia hororo! Mi plorĝemis, la frunto surgrunden.

Mi restis tie, restadis longtempe. Poste mi rimarkis ke ekvesperiĝis. Tiam deziro stranga, freneza, deziro de malespera amoranto ekkaptis min. Mi volis tranokti apud ŝi, pasi lastan nokton kun ŝi, plori sur ŝia tombo. Sed oni vidus min, oni elpelus min. Kiel fari ? Mi ruzis. Mi stariĝis, kaj ekvagis en tiu urbo de la mortintaj. Mi iris, kaj reiris. Kiom ĝi estas malgranda tiu urbo kompare kun la alia, tiu kie oni vivas! Kaj tamen, kiom ili estas pli multaj ol la vivantaj, tiuj mortintaj. Ni bezonas altajn domojn, stratojn, tiom da loko, por la kvar generacioj kiuj samtempe rigardas tagan lumon, trinkas la akvon de la fontoj, la vinon de la vitoj, kaj manĝas la panon de la ebenaĵoj. Kaj por ĉiuj mortintaj generacioj, por ĉiuj restaĵoj de la homaro kiuj ĉirkaŭis min, preskaŭ nenion, iun kampon, preskaŭ nenion! La tero reprenas ilin, la forgeso kovras ilin. Adiaŭ!

Ĉe la fino de la vizitata mortintejo, mi subite ekvidis la forlasatan enterigejon, kie la maljunaj forpasintoj finfaras enmiksiĝi al la grundo, kie eĉ la krucoj putras, kie morgaŭ oni metos la lastajn venintojn. Ĝi estas plena de liberaj rozoj, de viglaj kaj nigraj cipresoj, ia malgaja kaj bela ĝardeno, nutrata per homa karno.

Mi estis sola, tute ja sola. Mi kaŭriĝis en verdan arbon. Mi kaŝis min tute komplete, inter tiuj grasaj kaj malhelaj branĉoj.

Kaj mi atendis, alkrampiĝante al la arbtrunko, kiel ŝippereulo al ŝiprompaĵo.

Kiam noktis komplete, ke la nokto estis tre nigra, mi deiris mian rifuĝejon, kaj senhaste ekmarŝis, per malrapidaj kaj obtuzaj paŝoj, sur tiu grundo plena da mortintoj. Mi longtempe vagis, longtempe, longtempe. Mi ne retrovis ŝin. La brakoj etenditaj, la okuloj malfermitaj, kolizianta tombojn per miaj manojn, miaj piedoj, miaj genuoj, mia brusto, eĉ mia kapo, mi iradis sen trovi ŝin. Mi tuŝis, mi palpis kiel blindulo kiu serĉas sian vojon, mi palpis ŝtonojn, krucojn, ferajn kradojn, vitrajn kronojn, kronojn de velkintaj floroj! Mi legis la nomojn per miaj fingroj, tuŝetante la literojn per ili. Kia nokto! Kia nokto! Mi ne retrovis ŝin!

Ne luno! Kia nokto! Mi timis, mi terure timis sur tiuj mallarĝaj vojetoj, inter du vicoj da tomboj! Tomboj! Tomboj! Tomboj! Ĉiam tomboj! Dekstre, maldekstre, antaŭ mi, ĉirkaŭ mi, ĉie tomboj! Mi sidiĝis sur unu el ili, ĉar mi ne plu povis marŝi tiel miaj genuoj fleksiĝis. Mi aŭdis mian koron kiu pulsas! Kaj mi ankaŭ aŭdis alian bruon! Kio? Konfuzan kaj nenomeblan bruon! Ĉu tiu bruon estis en mia frenezigita kapo, en la nepenetrebla nokto, aŭ sub la mistera tero ensemita de homaj kadavroj ? Mi rigardadis ĉirkaŭ mi!

Kiom da tempo mi restadis tie? Mi ne scias. Mi estis paralizita pro la teruro, mi estis ebria pro la timo, hurlonte, mortonte.

